Esperantologio / Esperanto Studies **1** (1999), 21–37

Esenco kaj estonteco de la Fundamento de Esperanto

Geraldo MATTOS

Se ekzistas libro, kiun ĉiu esperanto-parolanto devus havigi al si kaj plurfoje relegi, tio certe estas la verko, kiun la Bulonja Kongreso sankciis en sia *Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo* la 9-an de Aŭgusto 1905: *Fundamento de Esperanto*! Tie ni povas legi la plej gravan artikolon de la konstitucio, kiu legitimas nian movadon (Zamenhof 1991:37):

> La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.

Tiuj vortoj estis eksplicite klarigitaj en la Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto jam en la unuaj linioj de la unua alineo (Zamenhof 1991:43):

> Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, – estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo.

La sekvanta alineo komenciĝas per la starigo de la fundamentaj verkoj, kaj finiĝas per admono al la tuta esperantistaro tiam estanta kaj estonta (Zamenhof 1991:44):

> Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) la 16-regula *gramatiko*; 2) la «*Universala Vortaro*»; 3) la «*Ekzercaro*». Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj, li neniam permesis al si (almenaŭ *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝon kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

Estas interese observi, ke Zamenhof parolas pri leĝoj, kies atenco sekvigas punon aplikatan de la tera justico, kaj tuj poste parolas pri pekoj, kies praktiko sekvigas punon aplikatan de la transmonda justico, kaj certe nur la sendiaj francaj cirkonstancoj de la komenco de la 20-a jarcento perfortis lian volon paroli ne pri leĝoj, sed pri ordonoj, kiuj estas jam videblaj ekde la dua alineo de lia parolado al la partoprenantoj de nia Unua Kongreso, en Bulonjo-ĉe-Maro (Zamenhof 1929:361):

> Sankta estas la hodiaŭa tago.

La Akademio de Esperanto, kies morala aŭtoritato devenas de tiu sama Unua Kongreso de Esperanto, rekonas la gravecon de tiu verda biblio, kaj ĝuste pro tio la artikolo 9-a de ĝia Statuto preskribas, ke la Prezidanto demandu la kandidaton al akademia posteno pri lia fideleco al la Fundamento de Esperanto.

1. Esenco de la Fundamento

Kio tamen estas la Fundamento de Esperanto?

Mi opinias, ke la vera esenco de la Fundamento de Esperanto kaj ĝia efektiva konsisto levas ĝis nun diskutojn, kiujn estus necese esplori kaj fini, ĉar ni devus perfekte scii, kiuj estas la limoj de la ordonoj de la Fundamento. La opinio de Rikardo Ŝulco verŝajne resumas la diverĝojn de pluraj interpretoj de ĝia esenco kaj konsisto (Ŝulco 1987:30):

> La Fundamento konsistas el kvar partoj. Ili estas la deksesregula gramatiko en kvin lingvoj, la tiel nomata Universala Vortaro, la Ekzercaro kaj la malpli ofte citata seppaĝa Zamenhofa Antaŭparolo de 1905, skribita nur mallonge antaŭ la unua kongreso en Bulonjo ĉe maro.

La sekvanta alineo de la sama libro taksas tiujn kvar partojn en tia maniero, ke li sukcesu rajtigi la postulatojn de la Analiza Skolo, kies ĉefa kondukanto li estis post la forpaso de la karmemora Ludoviko Mimoo Espinalto, ĝia iniciatinto (Ŝulco 1987:31):

> La kvar partoj de la Fundamento estas heterogena miksaĵo. Vere kodaj, konsistigantaj veran kodon por la lingvo, estas nur la Gramatiko kaj la Vortaro. Ambaŭ strukturas la lingvon. La Ekzercaro kaj la Antaŭparolo estas jam **aplikoj** [lia grasa tipo] de la du unuaj. Kaj tiuj aplikoj jam enhavas deflankiĝojn de la lingva kodo, malĝustaĵojn ne konformigeblajn al ĝi.

En posta paĝo, li klarigas sian ideon pri la valoro de la Antaŭparolo kaj de la Ekzercaro en tia maniero, ke nenia dubo ekzistas pri ilia sekundara pozicio en la Fundamento (Ŝulco 1987:48):

> **Komplete akordigi la logikan aplikon de la baza kodo kun la Zamenhofa lingvouzo ne estas eble.** [Lia grasa tipo.] Tio egalus al la kvadratigo de la cirklo. Nek la Zamenhofa Antaŭparolo, nek la Ekzercaro povas esti leĝdonaj en Esperanto. Ili ambaŭ estas stilaj modeloj, individuaj aplikoj de nia lingvo. Almenaŭ la Ekzercaro ne estas senerara. Ĝi ne estas en ĉiuj partoj sklave imitenda. La sola rimedo por forigi tiun malakordigan dilemon, estas agnoski la prerogativon de la du kodaj partoj de la Fundamento antaŭ la du aliaj. Ĉe diverĝecoj inter ili la apliko de la logiko al la kodo liveras la ĉiam preferindan, la sole ĝustan Esperanton.

2. Enhavo de la Fundamento

La unua kritiko direktiĝas al la kvarparta Fundamento (Ŝulco 1987:30), kiu vere estas nur triparta: Gramatiko, Ekzercaro kaj Vortaro. Efektive ankaŭ la antaŭparolo estis sankciita de la kongresanoj, sed ĝuste tiu antaŭparolo indikas la tri verkojn de la Fundamento, kaj inkludi ĝin estus nur banala aldono, ĉar temas pri teksto, kiu nenie kontraŭas la esencon de la tuto. Cetere, se estas inkludata la antaŭparolo, kial ne tutegale inkludi la Deklaracion, per kiu la kongresanoj sankciis la Fundamenton de Esperanto? Pli grava kaj kondamninda estas la ideo, ke leĝodonaj estas la Gramatiko kaj la Vortaro, kaj pro pluraj kialoj:

a) La Gramatiko havas la sekvantan enhavon en siaj dek ses reguloj: fonologian (9 kaj 10), morfologian (1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 11 kaj 13), sintaksan (8), semantikan (12 kaj 14), leksikologian (15) kaj stilistikan (16). Sekve de tio, kiel estus eble mastri la lingvon per tia minimuma kodo? Lingvo estas plej multe interaranĝo, kaj por tia celo estas unu sola sintaksa regulo.

b) Tiuj reguloj, jam en la Unua Libro, aperas dum la plena regnado de la Historia Gramatiko (Diakrona Lingvistiko), kaj ilia tuta gramatika terminaro estas nur nomoj, kiuj tre malmulte instruas pri la respektivaj veraj signifoj kaj funkcioj de la priskribataj formoj de la lingvo. Estus do eksterordinara miraklo, ke homo povus alveni al la ĝusta uzado de la verboformoj kaj de la substantivaj, adjektivaj kaj adverbaj participoj, aktivaj kaj pasivaj, nur helpe de la 6-a regulo, precipe ĉar ĉiu el la kvin lingvoj de la Fundamenta Gramatiko havas alian verbosistemon, sed adoptas por ĝi la samajn nomojn de la gramatika tradicio!

c) Ĉar temas pri skemeco precipe morfologia, la reguloj ne respondas al pluraj fenomenoj de la lingvo, kiuj estis plene preterlasitaj, kaj ilin nur la Ekzercaro trudas al la esperantistoj: kial ni lasu en la nominativo la predikativon de la rekta objekto, se ne nur pro la ekzemploj de la Ekzercaro? Kial la predikativo adoptu adverban formon, se la responda subjekto estas nek substantivo, nek persona pronomo? Kial la estinta aktiva kaj precipe la pasiva participo de kelkaj verboj estas tiel maloftege uzataj, ke tiuj verboj verŝajnas esti tute nekompletaj?

d) Se temas pri kvinlingva gramatiko, la komuna saĝo portas nin al la penso, ke ĉiu el ili estis destinita por la koncerna popolo kaj por la koncernaj parolantoj, sed ni devas tamen, por perfekta kompreno de ĝiaj reguloj, multfoje apelacii al la kvar aliaj.

e) La vortaro estas kvinlingva, kaj do egale destinita por la koncerna popolo kaj por la koncernaj parolantoj, sed denove la signifo de ĉiu kapvorto vere dependas de la intersekco de la kvinlingvaj klarigoj. Bona demonstro estas la signifo de la vorto *akcento*, kies traduko estas ambigua almenaŭ en tri lingvoj (franca, angla kaj pola), en kiuj la vorto indikas ion percepteblan jen per la oreloj (aŭdata akcento), jen per la okuloj (vidata akcento: supersigno).

Se ni pensas pri la signifoj de la vortoj, eble estas oportune memori preskribon, kiu aperas nur en la franca teksto de la kvinlingva gramatiko, kaj kiun mi redonas per esperantigo de A. Albault (Zamenhof 1991:300–301):

> Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon, *kiu fiksas ĝian uzon.* [Mia kursivo.]

Estas vere domaĝe, ke la kursive skribita preskribo aperas nur en la franca gramatiko, ĉar ĝi estas ege utila por dedukti tri punktojn, kiuj estas la sekvantaj:

1. La plej granda graveco de la Ekzercaro. Efektive, el la tri oficialaj partoj de la Fundamento, nur du el ili povas fiksi la uzon de la vortoj: la Ekzercaro kaj la Vortaro. Ni tamen jam vidis, ke la Vortaro tion ne kapablas fari, ĉar ĝi tradukas ordinare vorton per vorto, kaj la plej multaj vortoj de la kvin etnolingvoj, kaj de ĉiuj aliaj, estas ambiguaj, vere dependaj de la kunteksto: tio certe okazas al ĉiuj etnolingvaj prepozicioj. Sekve de tio, restas nur al la Ekzercaro determini la “difinitan kaj konstantan signifon” de la prepozicioj kaj de multaj, se ne de ĉiuj aliaj vortoj. Se la Universala Vortaro ne helpas al ni, ni devas turni nin al la Ekzercaro, kaj per indukto el ĝia uzo aliri al la signifo de la prepozicio.

2. La neceso de la tekstoj de la kvin lingvoj. Ne ĉiu vorto de la Universala Vortaro aperas en la Ekzercaro, kaj do restas al ni nur la komparo de la kvin tradukoj por alveni al la ĝusta signifo de la vortoj.

3. La nesufiĉeco de la Universala Vortaro. Spite de la vortoj de Zamenhof, ke

“komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto” (Zamenhof 1991:46), la Universala Vortaro ne ĉiam lasas preter ia dubo la ĝustan signifon de kelkaj vortoj, kaj restas do al ni nur apelacii al la plej komuna uzado, per kiu iom post iom stabiliĝas la normo de Esperanto.

Ĉi tiu tria punkto estas senkonscie aplikata, kiam ia lingva neprecizeco, eble ia pensa nekompleteco povus estigi dubon, kian mi trovas en la 16-a regulo de la Fundamento, kiun mi citas per la traduko de nia iniciatoro, el lia Plena Gramatiko de Esperanto (Zamenhof 1939:256):

> La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo.

Nenie estis dirite, ke tiu regulo aplikiĝas nur al la singulara nominativa formo de la substantivo, sed ekde la unua jaro la esperantistoj akceptas la elizion nur ĉe la unua el la sekvantaj vortoj, kvankam ĉiuj estas facile prononceblaj: *hero' / hero'n / hero'j / hero'jn*.

Krom tio, la 16-a regulo rekte kolizias kun la 10-a:

> La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

Se la fina vokalo de la substantivo estas forlasata, la sola kohereco postulus, ke la akcento retroiru unu silabon direkte al la komenco de la vorto... sed la normo de la lingvo, apogata per ĉiam pli forta tradicio, tenigas la akcenton sur la sama silabo de la kompleta vorto, kvankam nun ĝia vere lasta silabo!

El ĉio supre dirita, mi konkludas, ke la precipa parto de la Fundamento estas la Ekzercaro, kiu fakte kompletigas la Gramatikon, en ties mankoj, kaj la Vortaron, en ties ambiguecoj, kaj mi donus al tiuj tri partoj jenan sinsekvon, se mi devus iel valorigi iliajn efikojn, sed ne iliajn rajtojn: la Ekzercaro, la Gramatiko kaj la Vortaro. Ili tamen estas ia sankta triunuo, kies eroj havas difinitan ordon, sed egalan valoron. Mi esperas, ke neniun skandalos tiu mia lasta metaforo, sed mi estas singarda homo, kaj mi do antaŭdefendas min per alia cito (Zamenhof 1991:46):

> [...] perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de *dogma* [mia kursivo] fundamenteco [...].

Kaj ni ne forgesu, ke Zamenhof mem konsciis pri la nesufiĉeco de la Gramatiko: la paragrafoj 27-a ĝis la 30-a de la Ekzercaro evidente kompletigas aspektojn de la gramatiko de Esperanto.

La dua kritikinda punkto estas la emfazo pri la erareco de la Ekzercaro, kiu lasas en la ombro kelkajn bonegajn lecionojn, kiujn ĝi prezentas. Efektive, pro la adverbo uzata en la komenco de la frazo, la aserto kredigas, ke eĉ la antaŭparolo eble enhavas erarojn (Ŝulco 1987:48):

> Almenaŭ la Ekzercaro ne estas senerara.

La Ekzercaro ne enhavas lingvajn erarojn, kaj tio pro la simpla motivo, ke ĝi estas leĝodona instrumento, kiu rajtas proponi esperantismojn. Mi parolos pri du el ili.

La unua aperas en la komenco de fabelo *La feino* (Zamenhof 1991:90), kiu estas evidenta historieto por infanoj, kaj komenciĝas per frazo, kiu estas bonega por la rakontado de avino al genepoj:

> Unu vidvino havis du filinojn.

Nu, bone!... Ni devas vidi tie, kaj aliloke de la sama fabelo (Zamenhof 1991:97) simplan aplikon de stila permeso por infanigi la lingvon!

La dua estas la uzo de nominativo en tiu loko, kie nun multaj preferas la akuzativon, ĉar temas pri prepozicio, kiu ne regas la substantivon (Zamenhof 1991:95), sed la tutan lokucion:[1]

> Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.

Mi opinias, ke ni estas liberaj kaj por sekvi la lecionon de la Fundamento (mi ordinare tion faras), kaj por preni alian vojon per la uzo de la akuzativo, sed kun grava diferenco: se ni uzas la nominativon, ni ne povas ĝui la ordoliberecon de la lingvo, ĉar estas pli bone restigi la rektan komplementon post la verbo, kvankam la okazoj de ambigueco estas tre maloftaj, se ili povas esti.

Mia tria kaj lasta kritiko al la ideoj de la Analiza Skolo estas ĝia apelacio al la logiko, precipe ĉar ĝis nun multaj havas la saman ideon, ke Esperanto estas logika (Ŝulco 1987:48):

> Ĉe diverĝecoj inter ili la apliko de la logiko al la kodo liveras la ĉiam preferindan, la sole ĝustan Esperanton.

Efektive, nenia lingvo estas logika, sed nur interne kohera, kaj tiu lingva kohereco sin ne apogas sur la logiko, sed sole sur sociaj faktoroj de la kulturo (kiom da soj!... sed la lasta estis konscie serĉita, kaj ĉio por eviti la rimitan esprimon *nur sur*!). Nenia logiko, sed nur la diverĝa kulturo klarigas, kial la greka lingvo postulas la verboformon en singularo post la plurala neŭtra vorto de la subjekto, dum la latina en tiaj samaj okazoj necesigas la pluralon de la verboformo.

3. Utiligo de la Fundamento

En la okazo de ia lingva demando, la unua paŝo de esperantisto devus esti la malfermo de nia lingva konstitucio, kaj ŝajne tri eblecoj povas prezentiĝi al la demandanto:

1. Nenio en la Fundamento respondas al nia bezono, kaj ni do estas liberaj por elekti la plej bonan vojon por la solvo de nia malfacilaĵo.

2. La problemo estis preterlasita de la Fundamento, sed el analogaj kazoj de la Ekzercaro ni povas veni al klara dedukto de la plej bona solvo.

3. La dubo havas evidentan respondon, sed paradokse duoblan: unuj frazoj en la Fundamento kondamnas, kaj aliaj rajtigas la solvon.

1. Nenia respondo en la Fundamento

La unua punkto dependas de tio, kian liberecon la propra Fundamento konsentas al ni, sed la jam citita *Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo* (Zamenhof 1991:37) indikas perfekte la limojn de la proponoj de neologismoj, kiaj mi konsideras ne nur la novajn vortojn, kiuj grandigas la leksikon, sed ankaŭ la novajn dirmanierojn, kiuj vastigas la sintakson:

> Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto », ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo.

[1]Lokucio: aro da vortoj, kiu estas unuo de la propozicio.

Tiu simpla frazo verŝajne donas al ni perfektan ideon pri la esenco de la Fundamento de Esperanto, kiun ni povas resumi jene:

a) Reformoj de la strukturo de la lingvo estas strikte barataj, ĉar ili evidente staras ekster la ideoj, kiuj ne povas esti oportune esprimataj per la materialo de la Fundamento.

b) La vortoj "ĉiu alia lingvo" emfazas, ke Esperanto estas lingvo, ne projekto de lingvo, kaj ĝin ni do devas preni por adekvata komunikilo, kiu tamen pro sia juneco prezentas mankojn, kiujn la esperantistoj rajtas plenigi, sed ne ĝis ia atenco al la Fundamento.

c) La frazo "kiel estas farate en ĉiu alia lingvo" donas al ni fekundan parametron por niaj mankoplenigoj: kion ni rajtas proponi por niaj denaskaj lingvoj, tion ni egale rajtas proponi por Esperanto.

Mi tamen estas daŭre konsternata de la malvolonteco, kiujn multaj parolantoj manifestas kontraŭ pluraj aspektoj de la lingvo per siaj proponoj ŝanĝi tiajn kaj tiajn ĝiajn partojn: la plaĉo al modifoj kaj rektaj proponoj de reformoj estas facile videblaj, nun precipe en kelkaj diskutforumoj de la reto. Al unu el tiaj diskutoj mi reagis per la sekvantaj komentoj:

> La fakto, ke multaj esperantistoj interesiĝas pri lingvomodifoj, signifas nur la marĝenecon de Esperanto, kiu ne estas patrina lingvo, trinkata kune kun la patrina lakto...
>
> Nur por doni ekzemplon: Ni diskutas pri la finaĵo *-aŭ*, kiu aperas nur en malmultaj vortoj, sed ĝis nun la parolantoj de la portugala (ducent milionoj da ili) neniam plendis pri tiu sama diftonga finaĵo, kaj la plej malbone *nazala*, en la tria persono plurala de la prezenco kaj de la preterito de ĉiuj portugalaj verboj kaj en kelkaj substantivoj: *acordam* 'ili vekas / ili vekiĝas' kaj *acórdão* 'tribunala decido' – la prononco estas egala. Kiam la movado havos pranepojn, kies patro, kaj avo, kaj praavo estis denaskaj esperantistoj, ĉu ili havos tian inklinon diskuti pri eblaj modifoj de la lingvo? Mi opinias, ke ni devas akcepti Esperanton tia, kia ni ĝin ricevis de niaj antaŭuloj, kun la sola ebleco riĉiĝi por akompani la naturan evoluon de la monda kulturo. Mi vidas nenian fruktodonecon en tiaj diskutoj pri reformoj.

Se temas pri veraj mankoj en la lingvo, ni povas agi konforme al la principoj de la Fundamento. Cetere, la kreinto de Esperanto estis mem la plej granda enkondukanto de novaj vortoj, kaj li tial ne rajtus tion malpermesi al aliaj. Tian eblecon kreskigi la vortaron li eksplicite konsentis per la teksto de unu el la alineoj de la Antaŭparolo, sed li ĉiam proponis per sia propra uzo nur leksikajn elementojn, kiuj estas lingveroj, sed ne koderoj, ĉar li konsciis, ke prefiksoj kaj sufiksoj, prepozicioj kaj konjunkcioj estas parto de la animo de la lingvo (Zamenhof 1991:47):

> *Riĉigadi* [lia kursivo] la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la *literaturo* [lia kursivo]...

Spite de la opoziciado plej violenta [uzo nur por klarigo de la ekfrapo de la novismo] opoziciado de la ĝisostaj konservativuloj, de tia avalo de Zamenhof malfrue profitis la redaktantoj de *Plena Vortaro* (1930) kaj Waringhien, aŭtoro de *Skizo de Esperanta Metriko* (1932), sed tiuj du verkoj proponis nur vortojn, kiuj havas nenian rilaton kun la gramatiko de la lingvo. Estas tamen lamentinde, ke pli proksimaj al niaj tagoj, kelkaj verkistoj, inter kiuj elstaris Karolo Piĉ, iris tiun malfermitan vojon, sed ĉi tiuj lastaj ne kontentiĝis per la pruntepreno de leksikaj unuoj, sed invadis la animon de la lingvo.

Mi penos klarigi iom pli mian opinion pri la absoluta nedezirindeco de la persona enkonduko de novaj gramatikaj elementoj:

Ekzistas du tipoj de neologismoj: a) Neologismo, kiu pligrandigas la leksikon, sed ne la gramatikon de la lingvo. b) Neologismo, kiu pligrandigas la gramatikon kaj do egale la leksikon de la lingvo. Principe, la leksika neologismo estas ĉiam akceptebla, kaj ĝia sorto dependas de la parolantaro, kiu povas inkludi ĝin en sian vortostokon aŭ simple ĝin rifuzi kaj do mortigi: neniu gramatikisto devos iam paroli pri ĝi. Efektive, neniu parolanto mastras la tutan kvanton da vortoj de sia lingvo, kaj kelkaj pliaj povas koncerni lin nur tiam, kiam la tuta parolantaro altrudos ĝin al li... Kontraŭe, la gramatika neologismo efektive modifas la lingvon, kaj do ĝi devas aperi en ĉiu studo pri la lingvo, en ĉiu ĝia gramatiko: ĝi estas ekstreme danĝera por la lingvo. La helplingva movado havas historian ekzemplon: tiaj neologismoj formortigis Volapukon! Ĉiu el tiuj du tipoj de neologismoj povas havi unu el du devenoj: a) Neologismo, kiu estas formo de alia lingvo. b) Neologismo, kiu estas nova formo de Esperanto.

La leksika neologismo el alia lingvo necesigas, ke ni tre atentu pri ĝia utileco, ĉar ĝia venko iel modifas la signifozonon de la aliaj similsignifaj vortoj, sed ordinare provokas nenian danĝeron, kvankam malbona elekto povas estigi iajn malagrablaĵojn: la vorto *fiki* estis verŝajne malbone elektita, pro la kelkaj aliaj vortoj, kiuj finiĝas per tiuj du samaj silaboj... La proponanto tamen devas ĝisfunde koni Esperanton por eviti krudajn formojn por la ordinara fizionomio de la lingvo: mi ekzemplas per la vorto *fajnajta*, kiu ŝajnas al mi monstraĵo... ĉar Esperanto estas tre ŝpara koncerne ne finajn diftongojn. Ĝuste pro tio, la konsilo de Zamenhof (1991:47) estas daŭre utila: "konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo..."

La leksika neologismo el la propra lingvo submetiĝas al la samaj reguloj de akcepto kaj rifuzo, sed estas efektive nur eltrovo, ne novigo. Estas ofte, ke esperantisto sentas ian mankon, kiam unu el la vortoj de lia gepatra lingvo ne trovas bonan ekvivalenton en la verda. Mi ekzemplas pri la verbo *tempumi* 'konsumi kvanton da tempo / resti ie kvanton da tempo', kiun mi jam uzas de kelka tempo: "Atendu min, ĉar mi ne tempumos". Cetere, multaj neologismoj povus esti facile evitataj, se ni nur pensus pri tiuj mirindaj *-uma, -umo, -umi*. La gramatika neologismo estas ege danĝera, ĉar la modifo de la lingvo estas evidenta. Se temas pri gramatika neologismo de alia lingvo, tiajn neologismojn mi opinias frenezaj lingvaj pruntoprenoj neniel kaj nenial akcepteblaj. Cetere, ordinare tiuj proponoj ne venas por kompletigi tian mankon, kian provokas ideo ne esprimebla per la materialo de la Fundamento. Ni pensu pri la konjunkcio *estiel*, kiun PIV (1970:251) mise gastigas, kaj klarigas jene:

> Partikulo, proponita por eviti la konfuzon inter la kompara k la identiga sencoj de **kiel**, k signifanta: 'estanta', 'havanta efektive la karakteron de' ks: *li estis vera pagano, sed li mortis estiel kristano.*"

Du difektoj aperas en tia akceptita vorto:

1. La neologismo devigas la parolanton al tre delikata distingo, ĉar li ekhavos tri eblecojn por lia pensomanifesto: *estiel, kiel* kaj *kvazaŭ*... Cetere, kiuj aliaj lingvoj

iras al tiaj harfendaj detaloj? Krome, se temas pri ideo, kiun la parolanto rigardas tre grava, kial konfidi la transiron de la informo al unu sola vorto, kiun eble nur deko da homoj komprenos?

2. La ideo estas nature esprimebla en bona Esperanto, sen ia neceso de neologismo. Efektive, estas du formoj, kiuj redonas ĝian tutan signifon: *Li estis vera pagano, sed li mortis kristano / li estis vera pagano, sed li mortis estante kristano.* Kaj alia motivo por la rifuzo de tia neologismo estas la fakto, ke la participo *estanta* estas perfekta traduko de la neologismo, kaj tion konfirmas la propra difino de la vortaro, krom egale trisilaba: *Mi obeas vin estiel reĝon / mi obeas vin estantan reĝo.*

Se temas pri gramatika neologismo de la propra lingvo, tiuj provokas verŝajne nenian rompon, nenian skandalon, ĉar ili jam ekzistas esence en la lingvo, sed ne materie: bona ekzemplo estas la prepozicio *far*. Kompreneble, ili dependas de la akcepto de la tuta popolo, ne nur de elito, kaj ili povas esti akceptataj sendepende de la historia fakto, ke la prepozicio *far* devenas de la verbo *fari*, dum la verbo *peri* devenas de la prepozicio *per*: tiuj du paroj estos absolute egalaj el la sinkronia vidpunkto.

Bedaŭrinde, la troa amo al neologismoj, precipe al tiuj, kiuj permesas eskapi de la *mal*-vortoj, povas puŝi cetere bonegajn tradukantojn al veraj perfidoj de la originalo. Kaj mi prenas ekzemplon de Fernando de Diego, en lia traduko de la romano *La familio de Pascual Duarte*, de Camilo José Cela (1985:19), kie plurloke li tradukas la vorton *malo*, konatan de ĉiuj hispanlingvaj infanoj kaj adoltoj, per la vorto *mava*, kiun tre malmultaj esperantistoj iam aŭdis en sia vivo, kaj tre multaj certe neniam uzis:

> Mi, sinjoro, ne mavas, kvankam ne mankis al mi motivoj por mavadi. [Yo, señor, no soy malo, aunque no me faltarían motivos para serlo: mi, sinjoro, ne estas malbona, kvankam al mi ne mankos motivoj por esti tia.]

Verŝajne la emo al la propono de radikoj por substituo al kelkaj *mal*-vortoj dependas nur de interfero de la denaskaj lingvoj. Mi ne dubas, ke neniu pensas pri ia surogato por la esperanta, se lia denaska lingvo kaj Esperanto havas la saman *mal*-vorton, sed tiuj nur propraj al Esperanto vekas ian konsternon nutratan nur per la interlingva kontrasto: la vortoj *malkontenta* kaj *malatenta* (portugallingve: *descontente* kaj *desatento*) estas akceptindaj, sed la vortoj *malbona* kaj *mallarĝa* estas tute nekonvenaj, kaj devas cedi sian lokon al la vortoj *mava* kaj *streta* (portugallingve: *mau* kaj *estreito*)... Vere infaneca logiko!

Kaj multaj esperantistoj tute ignoras la fakton, ke iliaj gepatraj lingvoj certe havas multajn tiajn vortojn. La plej konata brazila vortaro de la portugala lingvo (Ferreira 1986:438–469, 747–787) havas 1505 paĝojn, el kiuj 45 estas dediĉitaj al vortoj formitaj per niaj mala kaj nea prefiksoj: 2.99% de la tuta verko... La saman kalkulon mi faris por la japana Vortaro de Esperanto (Miyake 1964:232–240, 262–268),[2] kiu havas 433 paĝojn, el kiuj 11 dediĉitaj al la respondaj esperantaj mala kaj nea prefiksoj: 2.54% de la tuta verko... Mi tamen konscias, ke kelkaj el tiuj *mal*-vortoj estas tre oftaj, kaj sekve ne la prefikso ĝenas, sed ĝia ofteco. Tion tamen ni ŝuldas nur al nia nekutimeco...

[2]Ne ĉiu vorto inter la indikitaj paĝoj de la brazila kaj japana vortaroj prezentas malan aŭ nean prefikson.

2. Analoga kazo en la Fundamento

La Fundamento de Esperanto estas malgranda verko, kaj ne povas havi respondon por ĉiu nia lingva demando, sed atenta senpartia legado ofte kondukas nin al bona solvo, eĉ se neregula formo estas jam vaste uzata.

En la komenco de Esperanto, eble kun la freŝaj reguloj en la kapo, Zamenhof ordinare prenis la sekvantan sintaksan manieron por ligi la predikativon al ĝia rekta objekto (Zamenhof 1929:66), kiu aperas interalie en unu el la artikoloj por la revuo *La Esperantisto* de la jaro 1890:

> Tamen se la ligo *trovos necese* [mia kursivo] fari iajn artajn ŝanĝojn en la lingvo, ĝi povas en ĉiu tempo ĝin fari, kaj neniu alia ekster la Ligo havas la rajton tion ĉi fari.

Alia ekzemplo de la sama jaro en unu el liaj traktaĵoj (Zamenhof 1929:260):

> Aparte malbona estis la sorto de tiuj sistemoj, kiuj naskiĝis post Volapük. Ĉar ĉiuj idealistoj, kiujn altiradis la ideo mem, jam estis volapükigitaj kaj tial ne sole ne subtenis la novajn sistemojn, sed kontraŭe, en la interesoj de unu lingvo por la tuta homaro ili penadis dispremi ĉian novan sistemon; kaj ĉiuj tiel nomataj homoj "praktikaj", kiuj *trovis malutile* [mia kursivo] labori por Volapük, ne volis ankaŭ labori por la novaj sistemoj, ĉar ankaŭ en tiuj ĉi sistemoj ili trovis nenian utilon.

Kaj longan tempon poste, en letero de 1906, ni denove trovas (Zamenhof 1929: 554) tiun saman sintakson:

> La unua eldono servis nur kiel provo; la dua servos por pli vasta propagando (kaj por propagando pli vasta mi *trovis necese* [mia kursivo] pli neŭtraligi la nomon kaj la antaŭparolon).

Kalocsay & Waringhien (1980:236) estas decide kontraŭaj, postulas la adjektivan formon por la predikativo de la objekto, apogas sin sur la ebla konfuzo inter predikativo kaj maniera adverbo, kaj pravigas sian opinion per kelkaj ekzemploj de Zamenhof:

> *b)* kiam la predikativo estas adjektivo, kaj rilatas al infinitivo aŭ propozicio, ĝi ne povas esti adverboforma, ĉar tiam okazus, multe pli ofte ol ĉe la subjekta predikativo [...], konfuzo kun vera adverbo: *li opiniis ebla, ke oni maldungu la komizojn* 'por li tiu maldungo estis ebla', dum: *li opiniis eble, ke oni maldungu la komizojn* signifus, ke tiu maldungo estis eble, verŝajne lia opinio. Jen kelkaj ekzemploj: *ni trovis necesa doni la sekvantajn klarigojn*[Z]; *mi trovas bona konigi la pruvosignojn kaj miraklojn...*[Z]; *oni trovas ebla, kion oni deziras*[Z]; *mi opinias konvena vigligi vin per rememorigo...*

Kaj ili trovis multajn imitantojn, sed estas interese citi kontraŭekzemplon de William Auld (1997:119), kiu plej vivis la lingvon, certe pli ol ĉiu alia nuntempa esperantisto:

> Kaj li trovis malfacile dormi dum la noktoj, pro la muĝado de la bovoj, la blekado de la azenoj, kaj la frato, kiu laŭdeve vizitadis siajn kromvirinojn.

Kvankam ilia gramatiko estas normiga, ili ne agis science, ĉar ili devus diri, ke la adverba formo tamen estas uzata en tiaj predikativoj. Ili apogas sian deklaron sur unu sola fakto: la ebla konfuzo. Tio ne estas sufiĉa por la starigo de regulo, precipe ĉar maniera adverbo ordinare aperas maldekstre de la verbo, dum la predikativo venas dekstre: *li eble opiniis, ke oni maldungu la komizojn* (ebla opinio) / *li opiniis eble, ke oni maldungu la komizojn* (ebla maldungo). La ekzemploj estis malbone elektitaj, se per tiuj ili deziris pruvi sian aserton: a) La tria ekzemplo havas elipsita la veran objekton, al kiu la sekvanta subordigita frazo estas simpla apozicio: *oni trovas ebla* [*tion*], *kion oni deziras.* b) La tri aliaj prezentus nenian ambiguecon, se la predikativo prenus la adverban finaĵon, ĉar la tuta propozicio restus absurda kaj sensenca, se tiuj adverboj [*necese, bone, konvene*] ligiĝus ĉu al la unua, ĉu al la dua verbo por indiki manieran cirkonstancon de unu el la agoj, kiujn tiuj verboj indikas, kaj tion sufiĉe pruvas la apero de tiuj adverboj maldekstre de la unua verbo pro la absurdeco de la transformita propozicio: *ni necese trovis doni la sekvantajn klarigojn*; *mi bone trovas konigi la pruvosignojn kaj miraklojn...*; *mi konvene opinias vigligi vin per rememorigo.* La sama absurdeco estus provokata per la apero de tiuj adverboj post la dua verbo.

La predikativo de subjekto nesubstantiva kaj nepronoma devas havi adverban formon, ne adjektivan, kaj tio estas nekontestebla ekde la sepa paragrafo de la Fundamento (Zamenhof 1991:85), kiu tekstas:

> Resti kun leono estas danĝere.

Simpla analogio portas nin al la adverba formo, precipe se ni konsideras, ke la kopulo simple estas ordinare elipsita en tiuj konstruoj: *Mi trovas resti kun leono [esti] danĝere.*

Evidente, la elipso de la kopulo devigas nin al la movo de la adverbo, ĉar ĝi estus adverbo de la dua verbo, se ĝi restus en tiu sama pozicio, kaj sekve ni ekhavas la kutiman formon: *Mi trovas danĝere resti kun leono.*

Alia pruvo estas la ebleco uzi subjunkcion, kiu transformus la objektan predikativon en subjektan, kun la rezulta apero de la deviga adverba formo: *Mi trovas, ke resti kun leono estas danĝere.*

Tio signifas, ke la rilato inter la predikativo kaj ĝia objekto estas egala al tiu, kiu ekzistas inter la predikativo kaj ĝia subjekto: kio do pravigus sintaksan diferencon? Nur klara ekzemplo de la Ekzercaro povus tion fari!

La analogaj kazoj de la Fundamento povas solvi lingvajn problemojn, sed ili havas alian funkcion, ordinare neglektatan pro la jam videbla premo de nia lingva tradicio, kiu starigas normon pli kaj pli potencan, ĝis ĝi estos tiel bremsa, kiel tiuj de la etnolingvoj: permesi la provojn vastigi la sintakson de la lingvo per novaj aranĝoj, ĝis nun kondamnataj, ne pro rekta atenco al la Fundamento, sed nur pro la kontraŭstaro de la fortiĝanta normo.

Mi denove citos du tiajn kazojn:

La unua temas pri la ebla disvastigo de la uzo de prepozicio rekte reganta infinitivon. Ekzemplon ni ja trovas en la Fundamento (Zamenhof 1991:133):

> Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon.

Kaj estus tute eble forpreni la verbon kaj utiligi substantivon post la prepozicio: Unu fajrero estas sufiĉa por la eksplodigo de pulvo.

Sekve de tio, se alia prepozicio permesas la saman transformon, neniu rajtus diri, ke ĝia praktikanto atencas la Fundamenton. La nun prezentataj ekzemploj mi ŝuldas al la ĝentila permeso de Claude Piron (retletero 1998 12 05):

> Li estis arestita pro (laŭdire) murdi iun en San Diego.
> Mi eklernis e-on nur post fini la duagradan lernejon.
> Ni diskutis pri unue solvi la monproblemon.
> Ni ne konsentis pri elekti lin prezidanto.

> Mi detenis min de respondi.

Estas facile vidi, ke ĉiu el tiuj ekzemploj permesas la transformon: pro la murdo / post la fino / unue pri la solvo / pri la elekto / de respondo. Tiuj ekzemploj tamen estas ankoraŭ maloftaj, kaj ilin certe dum tre longa tempo baros la opozicio de la normo.

La dua ekzemplo temas pri la elipso de la demonstrativo, kiun antaŭas prepozicio, kaj postas subordigita propozicio kun finitiva verboformo. La restigo de la demonstrativo estis kutima en la unuaj jaroj de la lingvo (Zamenhof 1929:20):

> Sed la nombro de la entuziasmuloj atingos certan ciferon kaj haltos, kaj la malvarma indiferenta mondo ne volos oferi sian tempon *por tio, ke* [mia kursivo] ĝi povu komunikiĝadi kun tiuj ĉi nemultaj – kaj tiu ĉi lingvo, simile al la antaŭaj provoj, mortos, alportinte absolute nenian utilon.

La Ekzercaro jam portas ekzemplon de la elipso de la demonstrativo (Zamenhof 1991:97):

> Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, *por ke* [mia kursivo] la virino povu trinki pli oportune.

Tio sama povas okazi al aliaj prepozicioj, kaj ili pekas nur kontraŭ la normo. La ekzemplon mi prenis de Kalocsay & Waringhien (1980:331):

> Li trairis la kadukan ponton, sen ke ĝi rompiĝus.

3. Evidenta respondo de la Fundamento

La estontecon ni konstruas en la estanteco per niaj revoj kaj laboroj – jes, ankaŭ revoj, ĉar tio estas la revoj, kiuj puŝas nin al la laboroj. Koncerne la Fundamenton de Esperanto, ni devas submeti al ĝiaj reguloj kaj modeloj ĉian lingvan dubon, kiun ni devas solvi, kaj la deirpunkto devas esti la Ekzercaro, ne la Gramatiko, pro la jam donitaj motivoj.

Tion bedaŭrinde denove ne faris la aŭtoroj de la *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, sed ĉifoje pri punkto, kiun la Fundamento lasas absolute senduba: la prononco de Esperanto. Kaj denove montriĝas forta la interfero de la denaskaj lingvoj, ĉar la aŭtoroj simple volas trudi la francan lingvan melodion al la tuta esperantistaro.

Kion instruas al ni la Fundamento koncerne la prononcon de Esperanto?

La Fundamento de Esperanto havas tri klarajn indikojn pri la elparolo de la lingvo, kaj tiuj estas la solaj prononcaj reguloj, kiujn gramatikisto povas postuli de la esperantistoj, ĉar ĉio cetera estus etnolingvaj influoj, kiujn neniu rajtas konsideri.

La unua indiko aperas en la franca gramatiko de la Fundamento (Zamenhof 1991:51), kiam ĝi pritraktas la alfabeton, kaj samtempe klarigas la prononcon, kiun ĉiu litero devas ricevi:

Ee,	[...]	Oo,
é		ô

La du lastaj el tiuj indikoj estas respektive la 9-a kaj la 10-a regulo de la Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Esperanto, sed ilin mi citas per la teksto de la Plena Gramatiko de Esperanto (Zamenhof 1939:255):

9) Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.
10) La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

Preterlasante la 16-an regulon, kiu traktas pri la du eblaj elizioj, ĉar ili nur nerekte aludas al la prononco de la lingvo, ni povas facile konkludi el la du reguloj de la Gramatiko kaj el la francaj klarigoj pri la prononco de du vokalaj literoj:

1. Prezentante la alfabeton, la Fundamento atribuas al la literoj po unu sola sono, kaj tial al ĉiu litero respondas unu sola sono, kaj al ĉiu sono respondas unu sola litero, sed estas akceptataj nur la fiziologiaj variantoj, kiuj dependas de la konsisto de la parolorganoj, kaj tial staras trans la povo de la parolantoj, ĉar ilia artikigo estas senkonscie perfekte farata: sen ia rekono de la parolanto kaj de la aŭdanto, estas longa la vokalo antaŭ voĉa konsonanto, kaj mallonga antaŭ senvoĉa.

2. La mezaltaj vokaloj estas faratan samtempe per du diferencaj buŝaperturoj (fermita/malfermita), per du diferencaj langaltigoj (alta/malalta) kaj per du diferencaj buŝinternaj spacoj (malvasta/vasta): la mezalta vokalo fermita, kaj alta, kaj malvasta plene respondas al la klarigoj de la franca gramatiko, kaj ilin mi sekve konsideras aparteni al la regula prononco de Esperanto.

Korolarioj de tiuj preskriboj de la Fundamento estas do la sekvantaj:

1. Estas tute vanaj la 59 linioj, per kiuj Kalocsay & Waringhien (1980:41) donas la regulojn por la prononco de longaj kaj mallongaj vokaloj en Esperanto, ĉar la Fundamento ne rekonas tiajn vokalojn, kiujn multaj lingvoj ne posedas, inter ili la portugala de Brazilo.

2. Egale senutilaj estas la 18 linioj, kiujn ili (1980:43) dediĉas al la distingo inter la alta fermita malvasta vokalo [en la francaj vortoj *net* kaj *sot*] kaj la malalta malfermita vasta vokalo [en la francaj vortoj *nette* kaj *sotte*].

Ili mem deklaras komplikaj siajn konsilojn, sed pardonigas sin per ilia deveno:

> La ĵus skizita prononcmaniero de vokaloj estas iom komplikita. Sed ties kaŭzo estas, ke ĝi estas rezulto de libera evoluo.

Kiel iama direktoro de la Sekcio pri Prononco de la Akademio de Esperanto, mi havis 24 sonbendigitajn voĉojn por mia studado, kaj la konkludo estis bona kaj malbona: la bona, ke la prononco ne malhelpas la kompreneblecon de la mesaĝo, sed la malbona, ke la malordo kaj la senreguleco estas kompletaj. Kaj tio tute ne surprizis min: se gramatiko (Kalocsay & Waringhien 1980:41–43) parolas, ke Esperanto posedas por du el siaj vokaloj po kvar variantoj (vasta longa / vasta mallonga / malvasta longa / malvasta mallonga) kaj por tri el siaj vokaloj po du variantoj (longa/mallonga), io iras ie tre malglate...

4. Estonteco de la Fundamento

La estonteco de la Fundamento de Esperanto dependas evidente nur de la esperantistoj mem, laŭ la ĝusta mezuro, kiel ili respektos ĝin, kaj plu studos ĝin por depreni de ĝi ĉion, kion ĝi ankoraŭ kaŝas en sia sino. Hipotezi pri la venonta konduto de la esperantistoj estas tre riska entrepreno, ĉar ĉiaj estontecoj estas eblaj. Se ni tamen konsideras la inklinon de multaj al reformoj, kelkaj el ili kapablaj denaturi la lingvon, ni rajtas timi, ke la estonteco de la Fundamento post ne tro longe povos fariĝi lamentinda estinteco... Ni tamen devas distingi la lingvan kaj la socian aspekton de la Fundamento.

4.1. La lingva aspekto

Se ni pensas pri la lingva influo de la Fundamento, ni certe devus resti iom seniluziiĝintaj, ĉar malmultaj gramatikistoj kaj esperantologoj apogas siajn konkludojn sur ĝiaj literaj instruoj, kiuj estas la sola reala garantio de la vereco de la lingva doktrino elmetata de la esploristo. Se sur ĉiu paŝo de niaj esploroj ni indikus ian konfirmon de la Fundamento, certe ne estus okazintaj du gravaj akcidentoj de nia historio: la apero de la Plena Analiza Gramatiko de Esperanto kaj la milito pri *ata-ita*...

Por ekzemplo de esploro bazita sur la Fundamento, mi resumas ĉi tie miajn konkludojn pri la verbosistemo de Esperanto, al kiu mi jam dediĉis plurajn paĝojn, ĝis mi ekhavis la necesan klarecon por atingi ĝian kernon (kaj la amika leganto bonvolu pardoni al mi la malmultan modestecon!):

La unua eraro estas jam antikva: la opinio, ke en Esperanto ekzistas tempa interrilato, ia minora "consecutio temporum" de la latina, ordinare nomata "la priparolata tempo", kiu venas almenaŭ ekde la 23-a de Februaro 1901 (Zamenhof 1948:17), sed estis akceptita de atistoj kaj itistoj. La finitivaj verboformoj montras vere duoblan rilaton, kiu estas indikata per unu el la tri vokalaj vorteroj:

-a-	1. Dum la dialogo.	2. Dum la fakto, kiun la verbo indikas.
-i-	1. Antaŭ la dialogo.	2. Post la fakto, kiun la verbo indikas.
-o-	1. Post la dialogo.	2. Antaŭ la fakto, kiun la verbo indikas.

Efektive, ĉiu finitiva verboformo rilatas kaj al la dialogo, kiu difinas la tempon (sinsekvo da momentoj), kaj al la propra fakto, kiu difinas la aspekton (stato de la fakto). La estanta verboformo kaj la estonta donas nenian problemon, ĉar ĉe ili la rilato al la dialogo kaj la rilato al la propra fakto sin interimplicas: "Mi vidas leonon" (Zamenhof 1991:85): dum la dialogo kaj dum la fakto vidi. "Mi rakontos al vi historion" (Zamenhof 1991:100): post la dialogo kaj antaŭ la fakto rakonti.

La tuta malfacileco, kiu klarigas la akrajn diskutojn havitajn kaj havatajn pri verboj kaj participoj, dependas nur de tio, ke la estinta finitiva verboformo estas ambigua en Esperanto, ĉar ĝi ĉiam signas la antaŭecon al la dialogo, sed ne ĉiam la postecon al la fakto, kiun la verbo indikas. Mia aserto estas nerefutebla ne pro la nomo de la verboformoj, sed pro la traduko de la estinta formo ĉe la litero b) de la 6-a regulo de la Fundamento en la franca parto:

> [...] *vi faris* – vous faisiez [mia aldono: ne finita fakto, sekve dum la fakto], vous avez fait [mia aldono: finita fakto, sekve post la fakto].

La lingva motivo de tia ambigueco en Esperanto estas tio, ke al Esperanto interesas unualoke la tempa situo de la fakto, ne ĝia aspekto de finiteco/nefiniteco. La historia motivo estas la elekto de la kreinto elimini la imperfekton preskaŭ survoje al la eldonejo de la Unua Libro... Evidente, tiuj imperfekta kaj perfekta sencoj de la estinta verboformo de Esperanto povas aldone esti konfirmataj per pluraj ekzemploj de la Ekzercaro, sed sufiĉu la sekvanta (Zamenhof 1991:97):

> En unu tago, kiam ŝi estis [antaŭ la dialogo, sed dum la fakto: nefinita – mia aldono] apud tiu fonto, venis [antaŭ la dialogo kaj post la fakto: finita – mia aldono] al ŝi malriĉa virino, kiu petis [antaŭ la dialogo kaj post fakto: finita – mia aldono] ŝin doni al ŝi trinki.

La decido pri finiteco kaj nefiniteco dependas ne de la teksto, sed nur de la kunteksto, kun la rezulto, ke la sola propozicio estas ĉiam ambigua, ĉar mankas al ĝi la kunteksto. Efektive, konstruo tre simila al la supra ekzemplo havas tamen alian interpreton simple pro la diferenca kunteksto (idem, ibidem):

> Kiam la bona virino trankviligis [antaŭ la dialogo kaj post la fakto: finita – mia komento] sian soifon, ŝi diris [antaŭ la dialogo kaj post la fakto: finita – mia komento] al la knabino: 'Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon' (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino).

Ni do konkludas, ke la finitivaj verboformoj de ĉiuj propozicioj de Esperanto privilegias la situon de la manifestataj faktoj subordigitan al la tempo de la dialogo: niaj finitivaj verboformoj estas tempaj, ne aspektaj.

Kaj nun ni transiras al la participoj, kiuj povas esti substantivoj, adjektivoj kaj adverboj: ili ne estas finitivaj verboformoj, kaj tial ili ne estigas faktojn, kaj kiel ĉiuj aliaj substantivoj, adjektivoj kaj adverboj ili ne rilatas al aliaj vortoj, sed havas sian tutan signifon en si mem kaj per si mem. Ili do ne konservas la kapablon rilati al la dialogo kaj provoki unu el la du vervaloroj (vera/malvera), kaj sekve restas por ili nur la aspektajn sencojn:

-*anta* kaj -*ata*	2. Dum la fakto, kiun la verbo indikas.
-*inta* kaj -*ita*	2. Post la fakto, kiun la verbo indikas.
-*onta* kaj -*ota*	2. Antaŭ la fakto, kiun la verbo indikas.

La signifo de la participoj estas nun tute klara, ĉar ili indikas nur la aspekton de la fakto: finita (estinta participo), nefinita (estanta participo), verŝajna, sed ne ekinta (estonta participo) en la realaj estinteco, estanteco kaj estonteco! Tion sufiĉe abunde pruvas la 22-a paragrafo da la Fundamento (Zamenhof 1991:106), el kiu mi kaptas po unu ekzemplo por la tri formoj de la participoj:

> Fluanta [dum la fluado] akvo estas pli pura, ol akvo staranta [dum la starado] senmove.
>
> Aŭgusto estas mia plej amata [dum la amado] filo.
>
> La tempo pasinta [post la paso] jam neniam revenos; la tempon venontan [antaŭ la veno] neniu ankoraŭ konas.
>
> Pasero kaptita [post la kapto] estas pli bona, ol aglo kaptota [antaŭ la kapto].

La ambigueco de la estinta verboformo ne plu ekzistas ĉe la respondaj participoj, ĉar la sama estinta finitiva verboformo povas respondi jen al la estanta, jen al la estinta participo (Zamenhof 1991:53), kaj do estas po du participoj por tiu verba formo, kiu servas samtempe al finiteco kaj al nefiniteco:

> [...] vi faris – vous faisiez [dum la fakto: faranta/farata – mia komento], vous avez fait [post la fakto: farinta/farita – mia komento].

La dua eraro estas la supozo, ke adjektiva participo egalas al la respektiva subordigita adjektiva frazo kun rilativa pronomo, kies eble lastaj eĥoj troviĝas sub la plumo de Kalocsay (1966:46):

> La prezencaj participfinaĵoj estas plene interrespondaj kun -*as*. Tio estas:
> -*anta* = kiu -as -*ata* = kiun oni -as

Tiu egaligo de adjektiva participo kaj rilativa frazo, konata kiel la ekvacioj de Isbrücker, aperis en artikolo de Johannes R. C. Isbrücker, prezidanto de la Akademio de Esperanto ekde 1937 ĝis 1963 (vd. Vilborg 1973:7–9). Tiu (mis)truko tute ne taŭgas por la kompreno de la participoj... Mi opinias, ke la plej granda parto de ilia erara uzado estas ŝuldata al tiu falsa ideo.

Kvankam eksterfundamenta, la plej bona argumento kontraŭ tiu egaligo estas la fakto, ke ne ĉiu rilativa frazo povas facile esti transformata en ian respondan participon. Mi mem ne scius diri, kiu estas la responda participo por la sekvanta rilativa frazo:

> La pastro, kiu mortis, loĝis en nia urbo.

Estus iom absurde pensi, ke la mortinta pastro loĝis en nia urbo...

Sekve de ĉio jam dirita, ni povas aserti, ke ne estas ia akordo inter la finitivaj verboformoj kaj la participoj, ĉar ili havas semantikajn strukturojn tute diferencajn: la unuaj dependas de la momentoj de la dialogo, kaj la duaj de la statoj de la propra fakto. Tion ni facile komprenas, se ni transformas la unuajn en la duajn:

> "[...] ĉiu, *kiu ŝin vidis* [mia kursivo], povis pensi, ke li vidas la patrinon" (Zamenhof 1991:90): ĉiu, *vidante* ŝin, povis pensi, ke li vidas la patrinon.

> "La reĝido, *kiu vidis* [mia kursivo], ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas" (Zamenhof 1991:107): La reĝido, *vidinte*, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas.

> "En unu tago, *kiam ŝi estis* [mia kursivo] apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino [...]" (Zamenhof 1991:97): en unu tago, *estanta* apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino.

> "*Kiam* la bona virino *trankviligis* [mia kursivo] sian soifon, ŝi diris al la knabino [...]" (Zamenhof 1991:97): *trankviliginte* sian soifon, la bona virino diris al la knabino.

> "tial, *se mi legos* [mia kursivo] en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj" (Zamenhof 1991, p. 95): tial, *legante* en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

> "*Kiam mi finos* [mia kursivo] mian laboron, mi serĉos mian horloĝon" (Zamenhof 1991:40): *fininte* mian laboron, mi serĉos mian horloĝon.

Egalan rezulton ni konstatas ĉe la transformo de la duaj en la unuajn:

> "*Promenante sur la strato* [mia kursivo], mi falis" (Zamenhof 1991:106): kiam mi promenis sur la strato, mi falis.

> "*Trovinte pomon*, mi ĝin manĝis" (Zamenhof 1991:106): kiam mi trovis pomon, mi ĝin manĝis.

4.2. La socia aspekto

Se ni pensas pri la socia influo de la Fundamento, ni devas rigardi al la nuna movado, kiu diversmaniere batalas por Esperanto, kaj pensi pri la nunaj ideoj pri la esenco kaj la estonteco de la propra lingvo Esperanto. Efektive, la nuna Esperantomovado dupartiiĝas, kvankam inter tiuj du partioj ekzistas sufiĉe granda intersekco de komunaj pensoj kaj sentoj, sed iliaj proksimaj celoj estas diferencaj, kaj la venko de unu el ili povos konstrui ion tute novan, pri kies efikoj ni ne povas ion aŭguri.

Mi parolas pri Finvenkismo kaj Raŭmismo. Mi ne tempumos en la priskribo de tiuj fidoj, sed nur rapide komentos mian senton koncerne ilin.

La Finvenkismo certe respektos la Fundamenton, ĉar Zamenhof neniam laboris specife por Esperanto, sed nur por la apero de ia dua helpa lingvo, al kiu li estus preta fordoni la konkerojn de Esperanto. Li tamen kredis, ke tre malfacile aperos ia alia lingvo tiel natura kaj fleksebla, kaj do insistis pri ĝia sekura disvolviĝo per la samaj proceduroj, kiuj evoluigas la etnolingvojn. Finvenkistoj ŝajne agnoskas, ke lingvo ĉiutage ŝanĝiĝanta havas nenian ŝancon akiri al si la favoron de la mondo. Ili eĉ povos en ia malproksima estonteco pensi ne pri veraj reformoj, sed pri etaj aldonoj al la lingvo per dirmanieroj kaj sintaksaj aranĝoj, kiujn la Fundamento lasas videti. Por profundaj reformoj, ili certe atendos la finan venkon, kiam plej granda potenco prenos al si la sorton de la unua neŭtrala lingvo de la tuta homaro.

La Raŭmismo ŝajne ne estas unupensa partio, sed plurtendenca movado, kiu verŝajne samopinias nur pri tio, ke Esperanto estas aparta lingvo de aparta minoritato, kunvenigita per diversaj komunaj interesoj, kiuj baziĝas sur ia sento de premiteco pro la historiaj lingvaj limoj de siaj medioj. Se la raŭmistoj sukcesos arigi sin ĉirkaŭ karisma estro kaj karisma estraro, ili povos veni al la penso, ke ili estas sufiĉe fortaj por fari la lingvon tia, kia ili ĝin volas, ĉar ili mem estas la estonteco de la lingvo.

Tio tamen estas nura supozo, kaj mi ne estas profeto.

5. Konkludo

Mi penis argumenti, ke estas eble sin turni al la Fundamento de Esperanto por la solvo de la lingvaj malfacilaĵoj, kiujn la regula kaj ĉiutaga praktikado montros al la parolantoj: la Fundamento kiel bazo kaj la tradicio kiel apogo povas indiki al ni la plej bonan vojon kompletigi la laboradon de nia iniciatoro. Liaj vortoj, skribitaj unu jaron post la lanĉo de la lingvo, estos do bona fermo por ĉi tiu referato (Zamenhof 1929:33):

> Por ke lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgraŭ la disĵetita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devis krei komunan fundamenton, sur kiu ĉiuj povas labori.

Kaj la esenca parto de tiu nia unua fundamento estis inkludita en la postan Fundamenton de Esperanto, kiun ni respektu kaj sekvu!

Bibliografio

Auld, William

1997 *Pajleroj kaj Stoploj – elektitaj prozaĵoj.* Rotterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Cela, Camilo José

1985 *La familio de Pascual Duarte.* Traduko de Fernando de Diego. Barcelono: Barcelona Esperanto-Centro.

Ferreira, Aurélio Buarque de Holanda

1986 *Novo Dicionário da Língua Portuguesa.* Rio-de-Ĵanejro: Nova Fronteira.

Kalocsay, K.

1966 *Vojaĝo inter la Tempoj.* La Laguna: J. Régulo.

Kalocsay, K. & Waringhien, G.

1980 *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.* Rotterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Miyake, Sihei

1964 *Vortaro de Esperanto.* Tokio: Daigaku Syorin.

Ŝulco, Rikardo

1987 *Sur la vojoj de la analiza skolo.* Paderborno: Esperanto-Centro.

Vilborg, Ebbe

1973 *La participa problemo en la akademio.* Gotenburgo: Lingva Komisiono.

Waringhien, Gaston

1932 *Skizo de esperanta metriko.* Budapeŝto: Literatura Mondo.

Waringhien, Gaston (Red.)

1970 *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. (Postaj eldonoj per offset.)

Zamenhof, Lazaro Ludoviko

1929 *Originala Verkaro. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj.* Lepsiko: Ferdinand Hirt & Sohn. (Fote reproduktita en 1983; Osako: Oriental-Libro.)

1939 *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto.* Parizo: Esperantista Centra Librejo.

1948 *Leteroj de L.-L. Zamenhof.* Prezentado kaj komentado de G. Waringhien. 1-a volumo. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

1974 *Proverbaro Esperanta.* La Laguna: J. Régulo.

1991 *Fundamento de Esperanto.* Deka eldono, kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de A. Albault. Pizo: Edistudio.

Adreso de la aŭtoro: Rua João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba, PR, Brazilo.
Retadreso: mattos@super.com.br

Ricevita 1999 03 05